

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama.

*Regulaj Klasoj en sabato: Daŭriga Kurso / Mezaj Klasoj 1, 2 kaj 3 / Jokohama Salono.

*Regula Klaso en merkredo

*Enkonduka seminario senpaga

okt. 29 (sab) 15h15-16h45, ĉambro 702

La "Ekspozicion al la Urbanoj", montritan dekstre, sekvas "Enkonduka Seminario" kiu anticipas Rudimentan Kurson, montritan sube.

*Rudimenta kurso

De nov. 5, por 10 semajnoj. Kotizo 5000 enoj.

*Hama-Ronda Vespero

nov. 19 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 604

Temo: Parolas Namba Humihiro

Ni aŭdu, kion s-ro Namba, vojaĝema kaj

komputilema, parolas pri siaj lastatempaĵoj. Eble pri la tri-dimensiaj bildoj sur komputilo? (Decembre, ne okazos Hama-Ronda Vespero. Anstataŭe, en la 17a de dec., ni havos jarfinan festenon ie. Detalon poste.)

EKSPOZICIO AL LA URBANOJ

En la 22a kaj 23a de oktobro, okazos Internacia Festo de Jokohamo, en kiu nia rondo aliĝos. Ni intencas ekspozicion pri Esperanto sub unu el la tendoj en la Parko Zoo-no-Hana en la havena distrikto de Jokohamo. La n-ro de la tendo estas 163, en la zono por internacia agado.

ZAMENHOFA FESTO DE KANAGAŬA

dec. 10 (sab) en urbo Ĉigasaki

Ĉi-jare, la festo okazos en la kunvenejo en la 4a etaĝo de la Civitana Kultura Halo de Ĉigasaki (Tigasaki-Simin-Bunka-Kaikan), piede 8 minutojn de la stacidomo Ĉigasaki. Detalon poste.



TIEL OKAZIS EN LA HAMA-RONDA VESPERO

sept, 17 (sab) 17h00-19h00, ĉambro 710
Temo: Rigardi DVD-filmon kun esperanta voĉo, "Simboloj por restarigo de Jokohamo - instalaĵoj konstruitaj en 1930".


Post la granda tertremo atakinta Jokohamon en 1923, oni konstruis multe da novaj domoj ktp, kaj la filmo temas pri ili, kompare al la scenoj nuntempaj. La filmo naskiĝis



laŭ la iniciato de s-ro ĈIBA Takasi, kaj ties klarigo en la japana estis tradukita esperanten de s-ino DOI Ĉieko, kiu mem voĉlegis. En la kunsido oni unue rigardis la filmon, poste aŭskultis rakonton de s-ro Ĉiba, poste komentita de s-ino Doi.

La DVD kun broŝuro estas mendebla je 1400 enoj.

■ Eldonas Aida Yayoi ■ Redaktas la organa fako de JER: Miyazaki Hideko
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)



LEGOKUNVENO

sept, 10 (sab) 14h00-16h00, komuna spaco malfermita en la 9a etaĝo

Libro: Sten Johansson, "Falĉita kiel Fajro" (al-fa-beto, 1997)

Aliĝis: Aida Yayoi, Iwaya Mituru, Koyama Takesi, Sibayama Noriko, Sibayama Zyun'iti, Takaoka Mitiko, Tanigawa Hiroshi.

Oni preparolis la impreson pri tiu ĉi krimromano. La skizo fare de Iwaya aperas sube.

Falĉita kiel fojno - aŭtentika krimromano

Mizro Iwaya

Tiu ĉi krimromano estas fajne ellaborita de la aŭtoro, Sten Johansson, kaj interesa. La strukturo tute konformas al modela krimromano: komence aperas ŝoka krimo, poste mistero kaj enigmo, ŝlosila eltrovaĵo, fine evidentiĝo de la tuta fakto. Ankaŭ hazarda koincido helpis min elkapti la planon de la romano. Ĉijara UK okazis en Kopenhago. Tiam mi vizitis ankaŭ sudan parton de Svedio, kiu estas ĝuste la scenejo de la romano. Malmo, Kalmar, Olando, Karlskrona, Vaxsjo, Kopenhago, Odense ... mi vizitis ĉiun urbon en tiu somero. Ĉi tiu lego rememorigis ilin al mi.

Konciza skizo de la romano estas jene. La sceno komencis sin en vilao apud lago de suda Svedio. Germana familio venis somerumi por tri semajnoj. Ili trovis tie kadavron "falĉitan kiel fojno". Tiamaniere sekvas inspektado de polico. Iom post iom klariĝis ke ĉefa motivo

de la krimo estis drogo, pli precize narkotaĵo. Unua apero de la krimulo estis tute normala kaj li ŝajnis sin filantropo. Poste klariĝis ke lia entrepreno estis ne bonfara sed simple profita, eĉ kontrabanda krimo.

Mi komparis tiun ĉi verkon kun la antaŭa legaĵo "Mistero Minora" (vidu Novaĵoj Tamtamas, 2010.10). La lasta havas pli detalan priskribon de la penso de ĉefrolanto, tial pli literatura verko. Dume la unua havas pli da drameca disvolviĝo. Ja tia devas esti populara kaj aŭtentika krimromano. Do tiu ĉi estas ĝuste taŭga por mister-amantoj.

Mi trovis en Revuo Esperanto de UEA, sept. 2011, ke la sama aŭtoro akiris duan kaj trian premion en ĉijara Belarta Konkurso en Kopenhago. Li ankoraŭ aktivas nun kaj eble produktos plian verkaĵon. Gratulinde.



EKSKURSO TRA LA MISTEROJ DE ROMO 2

Glaŭco G. Pompilio



De Placo Fiume ni iru al Placo Vittorio Emanuele kie troviĝas unu el la plej misteraj kaj nepenetreblaj lokoj de okultismo, la tielnomata Magia Kradpordo.

Tiu ĉi estas la loko kie sorĉistoj kaj alĥemiistoj, alvenintaj en Romo en la deksepa jarcento sekvante Reĝinon Kristinon de Svedio, kutimis kolekti. Kaj ĉi tie ili kutimis utiligi siajn distililojn kaj aliajn ilojn rilatantajn al ilia kulto

kaj kondukti siajn okultajn eksperimentojn kiel, ekzemple, transformiĝo de plumbo al oro aŭ kreiĝo de androgina estaĵo, kio estis, cetere, la revo, verŝajne realigita, de la granda sorĉisto Paracelso.

La skribaĵoj, la simboloj, la cifroj videblaj ĉe la fronto kaj la fosto de la pordo tre verŝajne estas la ŝlosiloj por penetri en la misterojn de la "Granda Verko", kiel alĥemio estis konata.

Daŭre venas ĉi tien kleruloj por deĉifri la skribaĵojn kaj por kompreni la simbolojn.

Dum la kleruloj studas la misterojn de la Magia Pordo ni iru vidi alian strangaĵon, kiu troviĝas en Placo Kampionoljo.

Temas pri la rajda statuo de la Romia Imperiestro Marko Aurelio.

Tiu ĉi statuo en la pasintaj tempoj troviĝis en la Katedralo de Sankta Johano en Laterano. Kiam oni decidis translokigi ĝin al Placo Kampionoljo oni konstatis ke la ĉevalo estas staranta sur ĉiuj kvar kruroj, io tre nekutima ĉar, laŭ malnova popolkredo, eĉ ĉi tie en Japanio, kvankam pro alia kaŭzo, kvar estas malbonŝanca numero kaj fakte la ĉevaloj de rajdaj monumentoj staras sur tri kruroj dume la kvara ŝvebas en la aero.

Sekve, antaŭ ol translokigi la statuon, oni "operaciis" ĝin tiel ke la ĉevalo staru diligente sur tri kruroj kun sia kvara kruro elegante ŝvebanta en la aero.

Sed la strangaĵoj pri tiu ĉi monumento ne limigas sin al la kruroj.

Fakte inter la haroj de Imperiestro Marko Aurelio troviĝas, kiam oni atente rigardas, malgranda strigo formita el la haroj mem.

Laŭdire, kiam la statuo estos reakirinta sian originalan oran koloron, la malgranda strigo viviĝos kaj ekkantos. Tio tamen estos, bedaŭrinde, la signo por la fino de la mondo.

La timiga fakto estas ke la verdeta koloro kiu nun kovras la statuon malrapide se konstante paliĝas en oran koloron...

Ni nun iru al alia tre konata loko en Romo: la Kastelo de Sankta Anĝelo.

Ĝi estas la fama fortreso kiu en la pasintaj jarcentoj kaj dum pluraj jarcentoj estis uzata kiel kruela malliberejo por tre konataj personoj. Tie la spiritoj de homoj malliberigitaj kaj mortigitaj fare de la Familio Borgia - dum longa tempo la mastroj de la kastelo - nun vagadas senpace.

Inter ili troviĝas la spirito de Ĝiaĉinto Ĝentili, kiu estis tie malliberigita kaj senkapigita laŭ la ordono de Papo Huberto la Oka, kiun Ĝentili, konata sorĉisto, klopodis murdi pere de magio.

De la Kastelo, post ne tre longa promonado, ni estas ĉe alia tre konata loko, la Romia Forumo.

Unu el la plej perturbantaj misteroj de la Forumo estas tiu de la drako, kiu, laŭdire, nun troviĝas sub tri kolonoj apartenantaj al la restaĵoj de tre antikva templo.

Flamoj kaj sulfuro estis kraĉataj el la buŝego de la drako, mortigante kiu ajn alproksimiĝis.

Fine Papo Silvestro la Unua, konata pro siaj magiaj povoj, batalis kun la drako kaj sukcesis ĝin enkatenigi.

Ĉar la tuta batalo okaziĝis en la nomo de Virgulino Mario, la Papo konstruigis preĝejon kaj nomis ĝin je Sankta Mario de Libero.

lom malproksima de la Forumo, sed agrable atingebla piede, estas Placo de Hispanio, alia tre konata loko en Romo.

Ĉi tie, antaŭ multaj multaj jaroj, la malbonfama kaj minaca Grafo Kaljostro estis arestita, kondukita al la Kastelo Sankta Anĝelo kaj poste transigita al la Fortreso de Sankta Leo

en Montefeltro, urbeto en la proksimeco de Romo, kie li estis enmurigita.

Kun li ankaŭ lia edzino Serafino estis arestita kaj, post lia kondamno, enfermita en la Monaĥejo da Sankta Olivo en la kvartalo Trastevere.

Laŭ onidiroj Serafino ne povis eskapi el tiu monaĥejo, kie ŝi estis praktike viventombigita, kiel ŝia edzo en Montefeltro, sed tamen ŝi subite malaperis, same kiel ŝia edzo, kiu, ankaŭ subite, malaperis el sia enmurigita ĉelo.

Ekde tiam, de tempo al tempo, noktatempe, estas eble vidi la silueton de la grafino eliri la monaĥejon, ŝvebi de Trastevere al Placo de Hispanio ĝis la loko kie ŝia edzo estis arestita.

Atinginte tiun ĉi lokon la figuro forvaporiĝas dume el nenie audiĝas la krio de la edzo alvokanta ŝian nomon.

Por fini nian ekskurson kaj ĉar ni estas en la temo de spiritoj kaj fantomoj, ni iru al Avenuo de la Tordita Murego.

Laŭlonge de ĉi tiu avenuo, en anonima tombo estis la restaĵoj de du revoluciuloj kies nomoj estis Targini kaj Montanari.

Ili, laŭ la ordono de Papo Leo la Dekdua, estis senkapigitaj kaj tie entombigitaj. Ĉar dum sia vivo ili agis kontraŭ la Katolika Eklezio, ili





estis rigardataj kiel ne indaj esti enterigitaj en sanktigita tombejo.

La spiritoj de la du viroj baldaŭ komencis aperi, sed neniam ili timigis homojn. Kontraŭe, estis multaj homoj, eĉ de malproksime, kiuj venadis por konsiliĝi kun la spiritoj.

Sed kiam posta Papo Gregorio la Dekkvara decidis formovi la restaĵojn al alia nekonata

loko, la spiritoj restis tie kaj fariĝis malamikaj al ĉiuj.

Anstataŭ doni bonajn konsilojn, kiel antaŭe, ili komencis timigi la preterpasantojn, eligante kriojn. Multfoje homoj svenis vidante la du fantomojn, kiuj aperis senkape kaj kun sia kapo subbrake.

Kaj per tio ĉi ni finas nian idealan ekskurseton tra la misteroj kaj strangaĵoj de Romo. (fino)



BELETRO

Tetrinkejo ĉe montokolo (Parto 3)

verkis Ogaŭa Mimei

esperantigis AIDA Kiyoshi

Kiam la gasto foriris kaj la avĉjo fariĝis sola, li elprenis la leteron de sia filo kaj legis ĝin. Li diris, "Baldaŭ venos malvarma vintro en via loko, sed ĉi tie restas agrable. Paĉjo, venu ĉi tien kaj vivu kune kun mi." La filo volas zorgi pri sia patro, ĉar li ne havas gefilojn. Li uzis la leterpaperon de sia produktejo. La letero ŝajne estis skribita en lia libertempo de la produktejo. La avĉjo dankis lin pro sia fideleco esprimita en la letero. Kaj li ceremonie metis ĝin en la tirkeston de la ĉambra altaro. La edzino, kiu longatempe dividis feliĉon kaj malfeliĉon kun la edzo, kaj kiu amis sian filon, nun restas kiel animo. Kaj li sentis, ke ŝi vidas ĉion ĉi. La avĉjo ŝanĝis akvon en la florcubo kaj preĝis antaŭ la altaro tintigante la sonorilon.

Tiam li rimarkis, ke iu venis ĉi tien. La maljuna kamparano eniris en la tetrinkejon dirante, "Vesperiĝas nun pli frue!" La avĉjo bonvenigis lin, "Ĉu vi estas survoje de la urbeto?" La kamparano eksidis apud la avĉjo, kaj varmigis sin per hibaĉo, kiun la avĉjo alŝovis al li kaj metis fajron al la malnova dika pipo.

Ili estis longatempaj amikoj de la elementa lernejo. Krome, ili havis aliajn amikojn, sed iuj mortis en sia juneco kaj iuj foriris de sia loko. Nun restis nur du homoj, kiuj en amikaj rilatoj senkaŝe povas rakonti pri privataj aferoj.

"Ĉu vi volas trinki sakeon?" "Mi volas trinki

kun vi ĉi tie anstataŭ aliloke en la urbo." Aŭdinte tion la avĉjo bruligis pinfoliojn en la fajrejo kaj ekboligis la akvon en la fera bolilo pendigita de supre kaj diris, "Oni diras, ke de la venonta jaro aŭtobuso trapasos ĉi tiun vojon. La vicvilaĝestro konsilis al mi, ke mi petu plej frue por ke la aŭtobuso haltu ĉi tie apud la tetrinkejo. Kiel vi bone scias, mi maljuniĝis iom post iom kaj mi volas iri al mia filo" – li kviete diris.

La maljuna kamparano aŭskultis la parolon dum li fumis la pipon kaj fiksrigardis malsupren al la brulanta fajro. "Vivi kune kun via filo estus plej bone, ĉar li estas por vi unu sola filo. Sed tamen vi loĝis longe en ĉi tiu naskiĝloko kaj mi bone komprenas, kiel vi sentas nun. Antaŭ ĉio vi bone pensu pri ĉi tiu afero kaj faru laŭ via plaĉo! Sed ne timu ĉu via komerco bone iros aŭ ne, kiam la aŭtobuso trapasos ĉi tien. Veturantoj de aŭtobuso estos limigitaj. Ĉiutagaj frekventuloj kun ŝarĝoj ne uzos la aŭtobuson. Aldone se falos neĝo, la aŭtobuso ne envenos ĉi tien. En vintro multaj homoj ripozas ĉi tie. Ne antaŭtimu! Observu trankvile kiel iros la afero kaj ne zorgu, kie la aŭtobuso haltos. Ĉiuokaze ni vilaĝanoj prizorgos vin. La kamparano konsolis la avĉjon.

(daŭrigota)

